Universala Esperanto-Asocio

**UEA EN MONDA EDUKA FORUMO**

Estrara Subteamo: MOVADO

EKO 2015-20 dissendita el Budapeŝto la 22an de majo.

Al: Landaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne), Fakaj Asocioj, la Komitato, Konsilianoj, ILEI, TEJO, listoj kaj unuopuloj


# UEA kaj Esperanto vidigitaj en grava Monda Forumo de Unesko

Kunlabore kun Korea Esperanto-Asocio, nome de UEA, tri koreoj ĉeestis en la Monda Eduka Forumo organizita de Unekso de la 18-a ĝis la 22-a de majo en la urbo Incheon, Koreio.

La tri personoj estas LEE Jungkee, estrarano de UEA, LEE Young-koo, prezidanto de KEA kaj Park Yong-sung, sekciestro de ILEI-Koreio. La slogano de UEA por la forumo estas 'Edukado por Mondo de Najbaroj', Apud la forumejo,Esperanto-budo estis starigita, permeson por tio ricevis nur naŭ Neregistaraj Organizaĵoj. Tio simbole diras, ke Esperanto estas unu el la gravaj organizaĵoj en la internacia komunumo. Oni taksis, ke du mil konferencanoj plus klasgrupoj kun instruistoj vizitos la budojn, KEA sekve presis trimil trilingvajn flugfoliojn por disdoni (vidu bildon en paĝo tri de EKO 18) kune kun Esperanto-naztukoj (unu videbla en la suba foto).




Kontakto kun Zambiano: S-ro Limbani Eliya Nsapato de la Afrika Ret-Kampanjo pri Edukado por Ĉiu.



Estrarano Lee Jungkee kune kun sia najbaro en la konferencaj kunsidoj, el la pacifika nacio Vanuatu, la prezidanto de la Koalicio pri Eduka Politiko de Vanuatu.

Pli da fotoj kaj informoj pri la Forumo ĉe:

http://goo.gl/wEN7tS

# Kandidatigoj bonvenaj: Ĝenerala Direktoro de UEA

La Ĝenerala Direktoro (ĜD) estas la ĉefa oficisto de UEA, kiu respondecas al la Estraro pri la mastrumado kaj kontrolado de la aferoj de la Asocio. La ĜD kunlaboras kun la Estraro kaj aliaj por realigi la mision de UEA, responde al la aspiroj kaj bezonoj de ĝia membraro, en la kadro de la Strategia Laborplano. Interalie, la ĜD, kunlabore kun la Estraro, gvidas la movadan kaj ekstermovadan politikon de UEA, zorgas pri la financa evoluigo de la Asocio, kaj kreas sistemojn kaj etoson por efika kaj harmonia teama laboro en la Oficejo kaj la gvidorganoj.

Inter la kvalifikoj por tiu posteno estas baza universitata diplomo; tre bona skriba kaj parola Esperanto (KER C1), kun grado de klereco pri la historio kaj kulturo de Esperanto kaj pri UEA; almenaŭ skriba rego de la angla; kaj laŭeble bona rego de aliaj lingvoj. Kandidatoj devus havi plurjaran sperton en respondeca posteno en regiona, nacinivela aŭ internacia asocio aŭ firmao, kaj almenaŭ bazajn konojn pri oficeja mastrumado, planado kaj komunikado. Dezirindaj estas pruvitaj konoj kaj kapabloj pri: membro- kaj donacvarbado; gvidado de volontuloj; kunlaboro kun volontulaj teamoj kaj estraroj; interkultura komunikado; kaj la gvidado de internaciaj neregistaraj organizaĵoj. Aktiva organiza sperto en la movado estas dezirinda.

Plena priskribo de la respondecoj, dezirindaj kvalitoj kaj bezonataj kvalifikoj ĉe tiu posteno estas trovebla en la retejo de UEA, ĉe www.uea.org/pdf/postenpriskriboGhD. Por kandidatiĝi, sendu leteron kaj kompletan vivresumon al la Centra Oficejo de UEA por alveni ĝis la **31-a de majo, 2015**. La plej kvalifikitaj kandidatoj estos invititaj al intervjuo kun estrara komisiono en Lillo, Francio, en la du tagoj antaŭ la komenco de la 100a Universala Kongreso. Enpostenigo ekde februaro 2016. Se necesas pliaj klarigoj, bv. kontakti retpoŝte la Prezidanton de UEA, d-ron Mark Fettes, mtfettes@sfu.ca.




## La TRIA TUTMONDA KOLOKVO pri la INSTRUADO de ESPERANTO

Tion organizis ILEI. La malferma ceremonio okazis en Neuchâtel, Svislando la 13an de majo. Vasta publiko, el nia movado kaj el lokaj rondoj, kunvenis en la aŭlo de la universitato. En la vestiblo vasta ekspozicio de diversaj dokumentoj kaj paneloj informis la alvenintojn. Libroservo funkciis, kune kun forporteblaj revuoj. Banderolo ekstere informis pri la evento kaj internaj ekranoj daŭre informis pri la Kolokvo. Alvenis 12 prelegantoj el 10 landoj kaj tri profesiaj interpretistoj. Tre efike ili tradukis al Esperanto; la solenaĵo okazis ĉefe en la franca lingvo. Alparolis la ĉeestantaron S-ro Kararash, membro de la kantona registaro, kiu invitis la Konferencon, la prezidanto de la parlamento de la urbo Neuchâtel kaj registarano de la urbo La Chaux-de-Fonds. Duncan Charters nome de ILEI substrekis la gravecon de la Kolokvo en la nuna evoluo de la instruado de Esperanto, li plie legis saluton de UEA. Sur la foto, la prezidanto de ILEI kune kun Monika Maire-Hefti, la Kantona Konsilantino en la departemento pri Edukado kaj Familio de la Kantono Neuchâtel.




Pli da fotoj kaj informoj: https://www.facebook.com/events/864093780315778/
kaj en Vikipedio: https://eo.wikipedia.org/wiki/Tria_Tutmonda_Kolokvo_pri_Instruado_de_Esperanto

## *Juna amiko:* nun legeblaj kaj elŝuteblaj rete




1974




1990




2008




2014

Ĉiuj numeroj de Juna Amiko (krom la lastaj du jaroj) estas legeblaj ĉe www.eventoj.hu sub la titolo **Juna Amiko - arkivo de 40 jaroj**. Ĉiuj permesoj kaj malpermesoj apartenas al eldonintoj de la originalo.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.